

# EKO 2023



Nia aganto pri  
instruado kaj  
progreso

**Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro**

**Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj**



**EKO 2023 / 55. Septembro 27, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbeglo Koffi.**

**Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 630 KB. Sume: KB 670**

## Denove kurso por hispanlingvanoj

En 2023 la kurso okazos de la 30-a de septembro ĝis la 22-a de novembro, tiel ke ĉiuj lernintoj povos post konkludo de la kurso tuj eniri Esperantujon per partopreno en la 4-an Virtuala Kongreso de Esperanto, komenciĝonta la 23-an de novembro: <https://vk.esperanto.net/2023>.

Ekde 2020 UEA, pere de sia Amerika Komisiono, kaj Kolombia Esperanto-Ligo (KEL), kunlabore kun Hispana Esperanto-Federacio (HEF) kaj TEJO, realigis virtualajn Esperanto-kursojn por hispanparolantoj. Ĝis nun aliĝis pli ol 1500 lernintoj el 29 landoj. La kursoj estas senpagaj kaj celas kaj komencantojn kaj progresantojn. Ĉiu lernanto havas aliron al vasta materialo, parolsesioj, lerniloj kaj virtualaj lecionoj gviditaj de spertaj esperantistoj, kiuj instruis la bazojn de la lingvo, prononcadon, historion kaj panoramon de la Esperanto-movado kaj aliajn temojn.

Ĝis la 26-a de septembro eblas aliĝi al la kurso per la ligilo [esperanto.co/cursos/c23/](https://esperanto.co/cursos/c23/). Ĉiujare la enhavo de la kurso pliboniĝas kaj la instrumentoj evoluas. Jam en 2020, okaze de la [Tago de Ameriko](https://youtu.be/IAeaTnP1tFM) (youtu.be/IAeaTnP1tFM) kelkaj el la lernintoj povis post la kurso prelegi flue. Simile en 2021, okaze de la [fermo de la 2-a eldono de la Esperanto-kurso por hispanparolantoj](#), kiam centoj da novaj esperantistoj ĉeestis kaj multaj povis esprimi sian dankon per la ĵus lernita lingvo.

Ĉar la kurso estas tute senpaga por ĉiuj aliĝintoj, kaj aldone UEA planas simbole kompensi la instruistojn kaj organizantojn, se vi volas kaj povas helpi, via donaco bonvenas al la Fondaĵo Ameriko de UEA (<http://uea.org/alighoj/donacoj/ameriko>).

## AMO ĝis la jarfino

La programo de Aktivula Maturigo pulsas antaŭen. Jen la sekvaj seminarioj de 2023:

AMO 103: Pollando/Italio: oktobro 19, 'Virinoj, kiuj ŝanĝis la mondon'

AMO 104: TAKE, Fortaleza, Brazilo, inter nov. 2 kaj 5: 'Tut-amerika kunlaboro'

AMO 105: Kroatio, novembro, 'Esperantaj libroj en la publikaj bibliotekoj'

AMO 106: Togolando, Lomé, dec. 21-24. 'Esperanto kaj Mono'.

## Toskano festos la Zamenhofan tagon

En Pisa, Italio, inter la 17-a kaj la 19-a novembro 2023 okazos la "Zamenhofa Aranĝo Toskana 2023 - ZAT Vi estas invititaj partopreni en kaj kontribui al la sukceso de tiu evento. Lasu vin allogi de la ĉarmo de la antikva Pisa Mara Respubliko, regalu vin per romantika promenado ĉe sunsubiro sur la famaj "Lungarni" jam aprezataj de Giacomo Leopardi, perdu vin tra la mezepokaj stratetoj por mirrigardi antikvajn turdomojn kaj atingi la grandan placon, kie iam kolektiĝis kavaliroj kaj hodiaŭ universitataj studentoj kaj fini la promenadon trovante vin sub la sonorilturo de Bonanno nome sub la klinaĝanta Turo en "Placo de la Mirakloj".

La "Zat 2023" komenciĝos ĉe la konsilia salono de la Urbodomo de Pisa kaj enhavos aranĝojn, de libroprezentado ĝis muzikaj koncertoj, prelegojn pri instruado, novajn teknologiojn, Esperantan bibliotekon historion ktp, kaj kun libroservo fare de konata eldonejo pri esperantista kulturo.

Ĉio okazos en la historia centro de Pisa, en belaj kaj komfortaj hotelaj ĉambroj je kelkaj paŝoj de la ĉefaj urbaj monumentoj. Estas planitaj promenaj kaj gvidataj vizitoj (en Esperanto kaj en la itala) al la ĉefaj interesaj lokoj de la urbo: turoj, preĝejoj, riverbordoj kun la historiaj konstruaĵoj, la tri Universitatoj de la urbo.

La programo troviĝas en <https://eventaservo.org/e/zat2023>. Multaj jam aliĝis, ne maltrafu la okazon, vi trovos junecan kaj dinamikan sed ĉefe internacian medion, kie vi povas renkonti novajn amikojn dum vi dividas vian pasion por Esperanto!

Aliĝu ĉe <https://forms.gle/styoaHftF3DLmyrm8> sendante antaŭpagon de 50 € al Edistudio Pisa. Kiu aliĝas ĝis la 2-a de oktobro, menciui sian vestmezuron, ĉar ricevos senpagan T-ĉemizon ĉe sia alveno!

## Esperanto por multlingva Eŭropo

EEU, helpe de Emilio Cid, kreis novan version de siaj retaj paĝoj, ĉefe por povi informi pri esperanto per la helpo de Guglo. La fina celo estas informi eŭropanojn pri esperanto pere de la kampanjo "Esperanto por multlingva Eŭropo",

<https://uea.org/vikio/Multlingvismo-esperanto>. Nun ni bezonas helpon por traduki mallongajn tekstojn troveblajn en tiu paĝaro al eŭropaj lingvoj, ĉefe en la paĝoj

<https://europo.be/eo/pri-europa-esperanto-unio/>

<https://europo.be/eo/europa-himno/>

Bonvolu NE komenci traduki sed interkonsenti unue kun [renato@esperanto.org](mailto:renato@esperanto.org) aŭ [cid.emilio@gmail.com](mailto:cid.emilio@gmail.com).

## Nova estraro kaj elano de Kongo DR

1. Prezidanto: Guy-Roger ILEKA
2. Unua Vic-prezidanto Remond MATA
3. Dua Vic-prezidanto: Arlain KIZEYIDIOKO MAYINDA
4. Ĝenerala Sekretario: MAFUILA MAVOMO Jackson
5. Kasisto: Joël MUHIRE
6. Kultura Konsilanto: Paul Alcée MAZANGU DIUMBEKI
7. Administra kaj financa Konsilanto: KAMBALE AMANI Love.

Cent membroj de UEA estas dezirindaj, tiel la lando fariĝos la dua en Afriko havanta komitatanon A en UEA. En 2022 ĝi havis cent membrojn, nun 87.

## Kursa kavalkado

La redaktoro de [edukado.net](https://edukado.net) informas vin ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Nomo: Intensa semajnfina lingvokurso  
Gvidantonomo: Zsófia Kóródy, Peter Zilvar  
Tipo: Nova movada kurso  
Loko: Herzberg am Harz, Germanio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27569>

Nomo: Kurso por komencantoj  
Gvidantonomo kaj aldoninto: Pierre GAUTHIER  
Tipo: Nova movada kurso  
Loko: Parizo, Francio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27571>

Nomo: Kurso de Esperanto en Izola (Sloveni)  
Gvidantonomo kaj aldoninto: Peter Grbec  
Tipo: Nova movada kurso  
Loko: Izola, Slovenio.

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27570>

Nomo: Esperanto 2  
Gvidantonomo kaj aldoninto: Giorgio Denti  
Tipo: Nova movada kurso  
Loko: Roma, Italio. <https://edukado.net/kursejo?kid=27573>

## Informa filmo por italoj pri Esperanto kaj ILEI

Ĝi estas en la itala, do por itala publiko. Se vi reg(et)as la italan, ĝuu ĝin. Ĉiu flua parolanto de Esperanto ja iom komprenetas la italan.

<https://youtu.be/6jyg0EY3MOc>

## Mesaĝo pri paco en la ĉina kaj japana afiŝo

La mesaĝo de UEA en la Internacia Tago de Paco nun havas tradukon en la ĉina. Tion pretigis ĈEL, kaj estis sendita de Chen Ji. Tio potence montras, kiel Esperanto povas kontribui al la multlingveco de nia mondo. En Japanio la landa asocio, JEI, eldonis afiŝon, kiun sendis Ikuko Kitagawa.



## Augusto Casquero memore

Multan parton de nia 1272-a Eo-elsendo el la 20.09.2023 ni dediĉas al la forpasinta en Valencio (19.09.2023) konata hispana esperantisto, aktivulo de la tiea Eo-movado, Augusto Casquero. Krom organiza laboro li ankaŭ multan tempon dediĉis al la Eo-instruado en tiaj lokoj kiel Madrido, 6 jarojn en la Fakultato pri Filologio en Valencio kaj multloke eksterlande. Temas i.a. pri Slovakio, Pollando kaj

Ĉinio, kie li pasigis longajn vivperiodojn. Ni memorigas lian alparolon kiel LKK-prezidanto de LKK de la Valencia UK en 1993 kaj nian interparolon en 2004; [https://pola-retradio.org/2023/09/e\\_elsendo-el-la-20-09-2023/](https://pola-retradio.org/2023/09/e_elsendo-el-la-20-09-2023/).

Barbara Pietrzak



Augusto Casquero estis oficiro de la hispania armeo, instruisto, logopedo kaj esperantisto (ekde 1969). Dum ses jaroj li instruis Esperanton en la filologia fakultato en Valencio, krome li instruis la lingvon en aliaj hispaniaj urboj kaj eksterlande, interalie, de Ĉinio kaj Usono. Kiel movadorganizanto Augusto Casquero estis prezidanto de Madruda Esperanto-Liceo kaj de Valencia Esperanto-Federacio, kaj dum 2005-08 de Hispana Esperanto-Federacio; komitatano A de UEA (2002-06, 2012-13) kaj prezidanto de la Loka Kongresa Komitato de la 78-a Universala Kongreso en Valencio (1993), vicprezidanto de Monda Turismo. Augusto Casquero (1945-2023) estas laŭreato de la internacia premio Ada Fighiera-Sikorska (2004) kaj de la diplomo de UEA pri elstara agado (2011). Legu nian nekrologon en La Ondo de Esperanto:

<https://sezonoj.ru/2023/09/nekrologo-71>

## Pasporta Servo - ekzercoj

Tio rilatas al vidbenda serio produktita en Kalifornio en la naŭdekaj jaroj. Inter la instrumaterialoj de [edukado.net](https://edukado.net) troviĝas multo por Pasporto. Ekzemple por ĉiu leciono estas detala horplano, taksado kaj aldonaj ekzercoj. Se vi metas en la kadron de serĉvorto nur la vorton Pasporto vi trovas eĉ aliajn rilatajn dokumentojn: <https://edukado.net/instrumaterialoj>. Se vi enskribas: Pasporto - Leciono vi trovos tiun ĉi liston:

Katalin Kovats

## Novjare en Germanio

20-a Novjara Renkontiĝo (NR) kaj 13-a Novjara Internacia Semajno (NIS) de la 27-a de decembro 2023 ĝis la 3-a de januaro 2024 denove en Wiesbaden ĉe Rejno, 40 km okcidente de Frankfurto/Majno, en la junulargastejo, en kiu ni jam trifoje agrable kunestis jarfine. Novjara Renkontiĝo estas kunveno por homoj el ĉiuj aĝgrupoj. Kunvenas kutime 180 ĝis 220 homoj; kvardeko ĝis sesdeko el ili estas infanoj kaj junuloj ĝis dudek jaroj. Krome ĉeestas paroj kaj unuopuloj.

Informa paĝo <http://esperanto.land/nr/#nr>

Aliĝilo <http://esperanto.land/nr/alighilo.shtml#alighilo>

La nuna unua aliĝperiodo finiĝos en lundo la 2-a de oktobro

===== vortoj: 1185 =====

**La kolekto de EKO por 2023:** <https://www.ilei.info/agado/EKO.php> (ĝis 50).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj.

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.